

ĈIU KIU SIN ALTIGAS ESTOS HUMILIGITA, KAJ KIU SIN HUMILIGAS TIU ESTOS ALTIGITA

-Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 14,1.7-14

Kaj kiam li eniris en sabato en la domon de unu reganto de la Fariseoj, por manĝi panon, ili lin observis.

Kaj li parolis parabolon al la invititoj, vidinte, kiel ili elektas la ĉefajn sidlokojn; li diris al ili: Kiam vi estas invitita de iu al edziĝa festo, ne sidigu en la ĉefa loko, por ke ne okazu, ke iu, pli honorinda ol vi, estas de li invitita; kaj tiu kiu invitis vin kaj lin, venos, kaj diros al vi: Cedu lokon al ĉi tiu; kaj tiam vi komencos kun honto preni la lastan lokon. Sed kiam vi estas invitita, iru kaj sidigu en la lasta loko, kaj tiel, kiam venos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi: Amiko, iru pli alten; tiam vi havos honoron antaŭ ĉiuj, kiu sidas kun vi. Ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigita.

Kaj li diris, al tiu, kiu lin invitis: Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku viajn amikojn, nek viajn fratojn, nek viajn parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn, por ke ne okazu, ke ili ankaŭ invitos vin, kaj vi ricevos rekompencan. Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj.

Ne estas konsilinde inviti Jesuon al tagmanĝo, almenaŭ por la fariseoj. Ĉiun fojon kiam ili provis tion fari, Jesuo falruligis ilian tagmanĝon. Ĉi tie estas la ĉapitro 14 kiu komenciĝis per la invito de unu el la fariseaj ĉefoj al Jesuo tagmanĝi kun li kaj kun la aliaj, okazis la incidento de la malsanulo je hidropso, kiam Jesuo demandis ĉu licas aŭ ne kuraci en sabato, kaj ili ne respondis.

Kaj Jesuo daŭrigas atakante ilian ambicion kaj "li parolis parabolon al la invititoj, vidinte, kiel ili elektas laĉefajn sidlokojn" Ne estas la unua fojo ke Jesuo riproĉas al la fariseoj elekti la unuajn lokojn. Tiu personoj tiom piaj, tiom devotaj, estas formanĝitaj de la ambicio, de la deziro elstari, kaj, citante tre konatan ekzemplon kiu troveblas ankaŭ en la libro de la Sentencoj, fakte ĝi estas prenita preskaŭ laŭvorte el la libro de la Sentencoj, en la ĉapitro 25

legeblas, *"Ne montru vin granda antaŭ la reĝo, kaj sur la loko de la eminentuloj ne stariĝu; ĉar pli bone estas, se oni diros al vi 'Leviĝu ĉi tien' ol se oni malaltigos vin antaŭ la eminentulo"*.

Jesuo do, citante tiun ĉi jam konatan ekzemplon, praktike per preskaŭ la samaj vortoj, konsilas: *"Kiam vi estas invitita, iru kaj sidiĝu en la lasta loko"*, sed atentu, ne pro humileco, ne pro modesteco, sed pro amo, por ke la alia povu ĝui avantaĝon. La unuaj lokoj en la manĝejoj estis tiuj kie oni estis servataj antaŭe kaj pli bone, elekti do la lastan lokon ne estas pro malsana sento je humileco aŭ je kiu scias kion, sed pro amo, por avantaĝi la alian.

"Ĉar, kiam venos tiu, kiu vin invitis, li diros al vi: Amiko, iru pli alten; tiam vi havos honoron antaŭ ĉiuj, kiuj sidas kun vi" Kaj jen la sentenco de Jesuo: *"Ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita, kaj kiu sin humiligas, tiu estos altigita."*

Sed, mi rediras, tio ne pro sento je modesteco, ĉiam pro amosento. Elektu ĉiam la alies bonon, tiam, kiam vi elektas ĉiam la alies bonon la Sinjoro, kiu vidas, prizorgos li vian bonon. Jesuo do inversigas la skalon de valoroj de la socio, kie ĉio estas farata pro intereso, kaj li invitas elektis lian vojon, kiu estas tiu de la sindono.

Kaj ankoraŭ *"Li diris, al tiu, kiu lin invitis: Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku viajn amikojn, nek viajn fratojn, nek viajn parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn"*. Ĉi tie estas kvar vidpunktoj kiuj referencas al la rilatoj de amikeco, parenceco, intereso, ni povus diri, iun klikon ligitan per intereso, per propraj negocoj. Temas do pri ligoj de amikeco, de parenceco, de intereso, temas pri ligoj kiuj subtenas iun socion kiu sinprotektas, je alies malavantaĝo.

Ne invitu do por defendi viajn posedaĵojn kaj vian bonfarton, *"por ke ne okazu, ke ili ankaŭ invitos vin. Male kiam vi faras festenon, invitu la forpelitojn"*. Ĉi tie Jesuo listigas tiujn kiuj estis la forpelitoj kiuj ne povis eniri en la templon kaj estis ekskluditaj de la sacerdoteco: la malriĉuloj, la kripluloj, la lamuloj kaj la blinduloj. *"Kaj vi estos feliĉa,"*

Jes dissemitaj en la evangelio ni trovas tiom da feliĉecoj, nome la inviton al pleneco de la feliĉo. La feliĉo ne konsistas en la farado de aferoj pro intereso, sed en la farado de aferoj pro amo, en la donaco.

Vi estos feliĉa, kial? *"Ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la ..."* atentu tio ne estas mesaĝo por la kredantoj. Jesuo parolas por la farideoj en la maniero laŭ kiu ili povas kompreni, *"releviĝo de la justuloj"* ĉar la fariseoj kredis ke la justuloj estus releviĝontaj, dum la aliaj ne.

Kion volas al ni diri Jesuo? Ne faru aferojn pro intereso, sed faru aferojn pro grandanimeco, okupiĝu pri la alies bono kaj vi ebligos poste al Dio sin okupi pri via bono kaj li tion faros abunde.